# KATOLIKA SENTO

'72

rm



U.E.C.I. ANNO 51°

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 51° - 1972**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO

nº 12

51a Jaro Decembro 1972

# GLORO AL DIO EN LA ALTOJ



# KAJ SUR LA TERO PACO

LA NASKIĜO DE KRISTO DONU AL NIAJ

KATOLIKAJ SAMIDEANOJ, RIĈA DE DIAJ GRACOJ

LA 1973-an JARON

# DIA LULKANTO

Vortoj de L. Minnaja | Muziko de A. Giannelli



## KRISTNASKO

Profunda vintra nokto oriente,
superverŝita de mistika paco;
de l' tempo fluas sankta hor' silente,
l' etoso plenas je ĉiela graco.

Ripozas kampe la paŝtista vivo,
sendorme staras vigle la brutaro;
mistero ŝvebas, gravas la motivo:
event' supera, eksterordinara.

Naturo haltis, ĉio ja senmova;
en grota stalo, el Virgin' Maria
naskiĝis nova koro, vivo nova:
alvenis por nin savi bebo dia.

Briladas alte la ĉiel' je steloj,
senfina volbo rave orpunktita;
tra la etero ĥore la anĝeloj
la gloron kantas por l' etul' naskita.

Al mond' ridetis la infana lipo,
kaj, post mizera historia prao,
feliĉe, ĝoje, el humila kripo
la tag' eklumis de la nov-erao.

Luigi Minnaja

ROMA ESPERANTA VOĈO
nº 112

## REMEMORO PRI L.L. ZAMENHOF

Decembro: lasta monato de la jaro, konkluda tempo. En ĝi elstaras ĝojigaj datrevenoj: la naskiĝo de la Princo de la paco kaj de la amo, kaj la proklamado de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Por ni esperantistoj aliaj du datrevenoj estas speciale memorindaj: la naskiĝo de d-ro Zamenhof kaj la ekvivigo de la "Lingwe uniwersala".

La 15-an de decembro 1859-a naskiĝis Ludoviko Lazaro Zamenhof en la pola urbo Bjalistok, tiam sub la rusa regado. Ĉi tiu urbo ludas gravan rolon en la historio de nia movado, ĉar oni ŝuldas ĝuste al ĝi, se ni hodiaŭ havas simplan internacian lingvon, se ni havas Esperanton. Bjalistok, loĝata de kvar diverslingvaj popoloj, ĉiam inter si batalantaj, estis la puŝmotivo por la estigo de nia lingvo, kiel Zamenhof mem skribis en la fama letero pri la deveno de Esperanto.

Forĵetinte diversajn infanajn utopiojn, li ĉiam pli kaj pli firme konvinkiĝis, ke nur unu lingvo internacia neŭtrala povos forigi ĉiujn kaŭzojn de miskompreno kaj de malpaco inter la homoj. Kaj li revis, revis pri la tuthomara lingvo, pri la sekva estonta interfratiĝo kondukanta al feliĉa mondo de paco kaj amo.

Tial li per ĉiuj fortoj sin dediĉis al la konstruado de la nova tutmonda paciga idiomo; kaj je la fino de la jaro 1878-a, kiam li estis 19-jara kaj frekventis la 8-an klason de la gimnazio, tiu celo ŝajnis jam atingita.

La 17-an de decembro areto da junaj amikoj kunvenis en lia studoĉambro por soleni la grandan eventon ĉirkaŭ torto ame kuirita de panjo Rozalia, kvazaŭ por la naskiĝa datreveno de Ludoviko.

Nekredebla ĝojo inundis la koron de la junuloj, granda entuziasmo eksplodis el ilia brusto, la gajeco invadis ilian animon.

La ideo, la granda ideo, kiu ĉiam akompanis jam de la infanaĝo Zamenhof, povos konkretiĝi. La lingvo de ĉiuj popoloj estis jam de li konstruita kaj povos servi por kunligi la homojn de la tuta mondo. Dum tiu kunveno la "Lingwe uniwersala" - unua formo de Esperanto - estis uzata la unuan fojon kaj ricevis la bapton de la malgranda publiko: kiel unua krio, unua alvoko, unua kanto en tiu nova lingvo solene sonis la himno al la homa frateco:

"Malamikete de las nacjes
Kadò, kadò, jam temp'està!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debà."

(Trad. "Malamikeco de la nacioj, falu, falu, temp'estas jam! La tuthomaro en familion unuigi devas sin.")

Sed amaran seniluziiĝon donis post tiu junula entuziasmo la viva realo. La revoj estas revoj, kaj la vivo ne konsistas el revoj. Kompatinda juna Ludoviko! Malicaj opinioj kaj mokoj akceptis lian genian kreaĵon. Anstataŭ gratulojn kaj kuraĝigojn li rikoltis nur miskomprenon, malkonfeson de siaj kolegoj, malfavorajn konsilojn de la profesoroj kaj konsekvencan severecon de la patro, kiu malpermesis al la filo plu laŭiri tiun vojon. Kaj li promesis... Sed de tiu tempo interne de li komenciĝis la plej turmenta lukto, la plej akraj suferoj, travivitaj en malgaja silento, dum li per streĉitaj fortoj obstine klopodis por perfektigi sian kreaĵon.

En la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno trovi -

ĝis kajero manskribita de la Majstro (bedaŭrinde detruita dum la lasta mondmilito), en kiu estis gardata parto de la laboro kaj de la lamentoj de ĉi tiu turmentita tempo. En ĝi estis originala poeziaĵo, verkita en la tiama pra-Esperanto en aŭgusto de la jaro 1882-a. Tradukita al la nuna lingvo internacia la poemeto, titolita "Penso", rakontas:

"Belan vesperon ekster la urbeto
malproksime nenio bruas;
kaj en la rondo unu knabineto
dolĉe deklamas.
Kaj pri vivo detruita
sente ŝi paroladis,
kaj mian vundon ne kovritan
senscie incitadis."

Ĉu vera rakonto? Ĉu efektiva okazintaĵo? Aŭ sidas en ĝi alegoria fantaziaĵo? Ĉu vere tiu ekskurso estis tiel memorinda kaj tiu knabino dolĉe deklamanta en la rondo tiel impresis lian menson kaj lian koron? Mistero! Ĉu pli vere en tiu knabino la poeto intencas simboligi la esperon, sian ĉagrenplenan, suferpostulan esperon? Li kun amara koro rememoras kaj lamentas:

"Ho miaj pensoj, ho miaj revoj,
ne pereigu min!
Al la gloro kaj al la devoj
multon mi oferis.
De mia vivo la parto plej kara
por mi estas for:
mia juneco sur la altaro
ofere forbrulas."

Kaj, kvazaŭ li revekiĝus el iu fatala subpremo, suferita kun trankvila rezignacio, li reagas kaj ribelas:

"Fajron mi sentas en la koro,
vivi mi volas!"

Sed, tuj post la subita eksplodo, li refalas en tiunka-

rakteran rezignacion, kvazaŭ iu interna forto malpermesus al li ĝuadon de la monda juna gajeco:

"Sed ĉe la gajuloj mi povas
esti nur fremda."

Kaj li konkludas la poemeton direktante sian korpreman preĝon al la Plejaltulo:

"Ho! Plejalta! se la sorto
trompi min volas,
nun kaj tuj rompu mian forton,
dum mi ankoraŭ esperas!"

Sidas en ĉi tiu poeziaĵo verŝajne la ĝermo de lia estonta agado. Superregas la tutan penson, la malgajajn rememorojn, la tutan bildon, la Espero. Probable jam kiam li verkis tiujn versojn, li estis pensinta pri la espera programo kaj pri sia pseŭdonimo Doktoro Esperanto. Tion supozigas ankaŭ la fakto, ke en lia unua libro malfermas la poezian parton ĝuste ĉi tiu poemeto iom pli ampleksa, en kies unua strofo li klare diras pri la espero:

"Sur la kampo, for de l' mondo,
antaŭ nokto de somero,
amikino en la rondo
kantas kanton pri l' espero.
Kaj pri vivo detruita
ŝi rakontas kompatante...
Mia vundo refrapita
min doloras resangante."

Kun la ŝarĝo de tiuj suferitaj travivaĵoj, kun koro maltrankvile batanta en la brusto, li transiris la Rubikonon. Kune kun la nova facila lingvo li klopodis enŝovi en la koron de la lernantoj ĝian internan interfratigan ideon, kaj la esperon pri estonta mondo pli bona .

En la Eterna Urbo sonis unuafoje la Zamenhofa poemo "La espero", kiu fariĝis poste la himno de la esperantistoj, de la porpacaj batalantoj. Fakte, la mem -

bro de la Reĝa Akademio de Sciencoj en Stockholm , Claes Adelskjöld, komponis por ĝi belan muzikon, kiun li publikigis kune kun la teksto Esperanta kaj ĝia franca traduko, dediĉis ĝin al la 3-a Kongreso por la Paco, kiu disvolviĝis en Romo en novembro de la jaro 1891-a, kaj disdonis ĝin kiel memoraĵon al ĉiuj membroj de tiu kongreso.

Pasis la jaroj pli malpli trankvilaj kaj iufoje eĉ turmentaj en la reformema periodo; sed la esperanta stelo, duonvualita dum longa tempo, plene brilis en 1905-a okaze de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-mer. Estis la jaro de la rikolto de la frukto post senlaca laboro de centoj da sindonaj personoj, kaj post doloroj serene suferitaj de la aŭtoro de la lingvo; estis la jaro de la unua triumfo. Emocie li unuan fojon paroladis al siaj kunbatalantoj, kaj ĉe la fino diris la plej inspiritan, la plej belan, la plej homan poemon de li verkitan; kun tremanta voĉo li alten levis al la Eternulo sian preĝon:

"Al vi, ho potenca senkorpa mistero,
fortego la mondon reganta,
al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
kaj fonto de vivo konstanta,
al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
hodiaŭ ni preĝas.
....................
Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
sed ĝi sin dividis batale;
popolo popolon atakas kruele,
frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
redonu la pacon al la infanaro
de l' granda homaro."

Sed bedaŭrinde, kiam plej kruele furiozis la unua mondmilito, la 14-an de aprilo 1917-a lia nobla koro, lia ardanta koro, frapita de tiel ŝira vastiĝanta doloro, haltis por ĉiam.

Finiĝis la milito kaj revenis la paco. En la kvin kontinentoj refloris nia movado; honore al doktoro Zamenhof kaj al Esperanto en centoj da lokoj oni dediĉis stratojn, placojn, arbojn, ŝtonojn, memortabulojn kaj monumentojn. Al ili, okaze de memorindaj datrevenoj, pilgrimas la fidela samideanaro por honori la grandan bonfarinton.

L. Minnaja

POR LA MOZAIKO honore al N.S. de la Espero en Nazareto:

| | | |
|---|---|---|
| Antaŭa sumo: | £ | 368.740 |
| P. kaj E. Puracchio (Romo) | | 1.000 |
| P.P. | | 2.000 |
| O. Risaliti (Firenze) | | 1.000 |
| Ĝis nun entute: | £ | 372.740 |

KUN ĜOJO NI POVAS INFORMI, ke la romano " La sklavoj de Dio" pri kies presado ni multe klopodis, hungare verkita de Géza Gàrdonyi kaj esperantigita de d-ro J. Hamvai el Nov-Zelando, estas jam sub preso en Budapeŝto, zorge de la Hungara Esperanto-Asocio, kaj oni povas esperi ĝian baldaŭan aperon. Kelkcento da ekzempleroj estas jam antaŭmenditaj. La verko estos certe unu el la plej gravaj kaj ŝatataj eldonaĵoj de ĉi tiu jaro en la esperantista kampo, kaj ĝi povos inde stari apud la plej famaj esperantistaj volumoj ĝis nun aperintaj.

BONFARA KASO. Antaŭa sumo: £ 55.000
6.000: Sias O.; 5.000: Sias E.; 3.000: R.Galeotti; 1.000: A.De Salvo; P.E.Puracchio. Post la kutima Kristnaska donaco al du maljunaj s-aninoj (20.000) restas: £.51.000.
La Kristnaska tempo invitas ankaŭ vin al donaceto, honore al la dia Infano, kuŝanta sur la pajlo.

ABONINTOJ POR 1973a: Bolonjo: R.Maudente; Catania: G.Zappulla; Napoli: A.Jacobitti; Padovo: E.Menegazzo; Pranzo (Tn): G.Paicher; Reggio Emilia: V. Munarini; E.Paglia; A.Fabbi; Romo: P.E.Puracchio; G.Kellner; M.Engelmunda; M.Tomassini; J.Christiaens; C.Canu; I.Galiardi; A.Scalia; M.Merlani; E. P.Tic; V.Di Tocco; Francujo: A.Augen; Hungarujo: J.Nagy; Hispanujo: A.Olivares Niqui; Jugoslavio: L. Kiŝ; Luksemburgio: H.Meier; Pollando: A.Gucwà ; K.Martynski; E.Jankowska; Z.Waradzyn; J.Nowakowski; D.Meierczak; E.Kowalska; M.Skribowieczka; T. Klej; H.Massalska; Entute: 269.

ĈU VI JAM RENOVIGIS VIAN ABONON.....?

NI PRIPLORAS LA FORPASON de s-ano Miuccio Felice (17a-11), kiu veninte el Messina al Romo por tre grava operacia interveno al sia malsana koro, ricevis ĉiuspecajn amatestojn kaj eĉ la sangon de la romaj esperantistoj.
Kaj ni sincere kondolencas al prof.ino Adelaide Antonelli, kiu perdis sian fratinon Maria, ame flegitan dum ŝia longdaŭra malsano, kun la sindona konstanta helpo de sia edzo, d.ro Aŭgusto Kohler, ambaŭ fervoraj esperantistoj.

LA SANKTA SIDEJO, post la morto de mons.E.Macheiner, elektis revizianto de la esperantaj liturgiaj

tekstoj, mons.on Alfred Pichler, episkopo de Banja Luĉka, en Jugoslavio. Ni ankaŭ dankas nian eminentan samideanon, bone konatan de la katolikaj romaj esperantistoj, ĉar li akceptis la gravan taskon. Pri la liturgiaj mestekstoj ni atentigas, ke ili estas preskaŭ entute pretigitaj (75 mesoj laŭ la 3 liturgiaj cikloj). Dum unu jaro (1973) ili estos denove entute reviziitaj de faka komisiono. Jam dum la 1973a ili povos esti prezentitaj iom post iom al la S. Sideja komisiito, kiu siavice, farinte siajn eventualajn rimarkojn, transdonos ilin al la koncerna "Konsilio por la plenumo de la Sankta Liturgia Konstitucio" por la prespermeso.

La nuna tuta kolekto de la festaj mestekstoj, validaj ĝis la apero de la esperanta mesalo kostas £. 3.000, kaj estas havebla ĉe P.G.Jacobitti.

NI RICEVIS ĜIS NUN tiom multajn kaj laŭdajn esprimojn pri nia Katolika Sento, ke kvankam ili kortuŝis nin kaj kuraĝigis niajn klopodojn, ne ŝajnis al ni konvene publikigi ilin. Tamen ni ne povas prisilenti la atentigon donitan al nia revuo de "Vojo, Vero, Vivo" Sept. 1972, mencianta ne nur plurajn titolojn pri legindaj artikoloj kaj poeziaĵoj de Luigi Minnaja el Katolika Sento, sed ankaŭ longajn pecojn de liaj verkoj.

EL LA FRANCA ĴURNALO "Nice-Matin" ni ricevis informon pri solena meso kantita en Cannes honore al Nia Sinjorino de la Espero, patrino de la urbo. La komponisto mem de la muzikaj partoj de la meso direktis ĝin. Oni povas tiel agnoski, ke la bela meso de M° Hector Benda, fariĝas la klasika meso de niaj esperantistaj kongresoj. La anonceto aldonis, ke Cannes estis verŝajne la unua urbo, kiu volis jam antaŭ multaj jaroj uzi Esperanton, kiel universalan lingvon, por kelkaj turismaj vojmontriloj.

Ŝajnas al ni, ke la temo elektita de la papo en la ĝenerala aŭdienco de la 15a de novembro: "Liberigu nin de la malbono", estas tiel aktuala por nia tempo, en kiu ĉiuflanke oni atakas la fundamentojn de la dia revelacio, ke niaj legantoj volonte aŭdos pri ĝi el nia bulteno. La papo, antaŭ ol paroli pri la neceso nepre urĝa en la Eklezio, sin defendi kontraŭ tiu malbono, kio estas nomata "Demono", invitas nin kontempli la belegan realon de la kreitaro. "Ĝi estas la mirinda spektaklo de la dia verko - diris la papo -, kiun Dio mem, kiel eksteran spegulon de sia saĝeco kaj potenco admiris pri ĝia fundamenta beleco (v. Gen. 1:10, ktp.).

Estas krome tre interesa la vidaĵo de la drameca historio de la homaro - diris la papo -, el kiu emerĝas la historio de la elaĉeto, de Kristo kaj de nia savo, kun ĝiaj mirindaj riĉecoj de revelacio, de profetismo, de sankteco, de vivo levita je supernatura nivelo, de eternaj promesoj (v. Efes. 1:10). Kiam oni kontemplas ĉion ĉi tion, oni ne povas ne esti ravita (v. S. Aŭgusteno: Monologoj): ĉio havas sencon, celon, ordon; ĉio permesas diveni ĉeestantan Transcendon, Menson, Vivon, fine Amon, tiel ke la tuta universo, el tio, kio ĝi estas kaj el tio, kio ĝi ne estas, montriĝas al ni kiel entuziasmiga kaj ravanta preparo al io, kio estas eĉ pli bela kaj perfekta (v. 1 Kor. 2:9; 13:12; Rom. 8:19-23). La kristana aspekto de la kosmo kaj de la vivo estas pro tio nepre optimisma; kaj ĉi tiu vidaĵo pravigas nian ĝojon kaj dankon pro la vivo, kaj tiel ni, glorante Dion, prikantas nian feliĉon (v. la

"Gloro"-n de la meso).

Sed ĉu ĉi tiu rigardo estas ekzakta? Nenion kontraŭdiras al tio la mankoj, kiuj estas en la mondo? la malfunkciadoj de multaj aferoj rilate al nia ekzisto?Sufero, morto? malboneco, krudeleco, peko, unuvorte malbono? Kaj ĉu ni ne vidas kiom da morala malbono estas en la mondo? precipe kiom da morala malbono samtempe, kvankam diversmaniere,kontraŭ la homo , kontraŭ Dio? Ĉu ĉi tio ne estas malĝoja spektaklo,malluma mistero? Kaj ĉu ne estas ni, ĝuste ni, kultantoj de la Verbo, prikantantoj de la Boneco, ni kredantoj, la plej sentemuloj, la plej konsternitaj pro la kono kaj la sperto de la malbono? Ni trovas tion en la naturo , kie tiom da ĝiaj manifestacioj ŝajnas al ni misordo.Ni tion trovas en la homa medio, kie ni konstatas malfortecon, difektiĝemon, suferon, morton kaj eĉ ion pli malbonan ol tion mem; ekzistas duobla leĝo inter si kontraŭstaranta, unu kiu volus bonon, alia inklina al malbono: turmento, kiun S.Paŭlo evidentigas por demonstri la neceson kaj la bonŝancon de la sava graco, tio estas de la savo donita al ni de Kristo;jam la pagana poeto rimarkis ĉi tiun internan konflikton en la homa koro: "mi vidas bonaĵojn, kaj mi ĝojas; sed mi sekvas malbonaĵojn". Ni trovas la pekon,kio estas misordo de la homa libero kaj funda kaŭzo de la morto, ĉar ĝi estas disiĝo el Dio, fonto de vivo, kaj siavice okazo kaj sekvo de interveno en ni kaj en la mondo de la mistera nia malamiko, la Demono. La malbono ne estas nur manko, difekto, sed aganto, viva kaj spirita estaĵo, perversa kaj perversiganto.Terura realaĵo! Mistera kaj timiga.

Foriĝas el la kadro de la biblia kaj eklezia instruado tiu, kiu rifuzas agnoski ĝian ekziston; aŭ tiu,kiu faras el ĝi sendependan principon, kiu ne havas, same kiel ĉiu kreitaĵo, devenon de Dio; aŭ tiu, kiu reko -

nas ĝin kvazaŭ pseŭdo-realaĵon, personigon mensan kaj fantazian de nekonataj kaŭzoj de niaj malbonoj. La problemo de malbono, rigardata en sia tuteco estas turmento, kaj ĝi estas la plej grava malfacilaĵo pri la religia kompreno de la kosmo. S. Aŭgusteno plendis: "Mi esploradis el kie devenas malbono, sed mi ne kapablis trovi ĝian solvon" (Konfes. VII, 5/7/11)

Jen do la graveco, kiun atingas la agnosko de la malbono por la ĝusta kristana koncepto de la mondo, de la vivo, de la savo. Unue en la disvolviĝo de la evangelia historio komence de la publika vivo de Jesuo: kiu ne memoras la signifoplenan evangelian paĝon de la triobla tento de Kristo? Poste, la multajn evangeliajn epizodojn en kiuj, la Demono kruciĝas kun la agadoj kaj la instruoj de la Sinjoro? Kaj kiel forgesi, ke Kristo trifoje, aludante al la Demono kiel al sia kontraŭulo, nomas lin "reganto de ĉi tiu mondo"? La danĝero de ĉi tiu ĉeesto aperas el tre multaj lokoj de la Nova Testamento. S. Paŭlo nomas ĝin: la "dio de ĉi tiu mondo (II Kor. 4,4) kaj admonas nin pri la luktado en la mallumo, kiun ni kristanoj devas havi ne kontraŭ nur unu Demono, sed kontraŭ ĝia timiga plureco: "Surmetu - diras la Apostolo - la tutan armilaron de Dio, por ke vi povu kontraŭstari al la artifikoj de la diablo. Ĉar nia luktado estas ne (nur) kontraŭ sango kaj karno, sed kontraŭ Reganto kaj Aŭtoritatoj, kontraŭ la mallumaj potenculoj, kontraŭ la spiritaroj de la malbono en la aero" (Efes. 6: 11-12).

Kaj, ke ne temas pri nur unu Demono, sed pri multaj, pluraj evangeliaj lokoj indikas tion al ni (Luk. 11:21; Mark. 5:a); sed unu estas la ĉefa: Satano, kiu signifas kontraŭulo, malamiko; kaj kun li multaj - ĉiuj kreitaj de Dio - sed forfalintaj, ĉar ribelaj kaj damnataj; mistera mondo, renversita de malfeliĉega dramo, pri kio tre malmulte ni konas.

Ni tamen sufiĉe scias pri ĉi tiu diabla mondo, kiu kolizias kun nia vivo kaj kun la tuta homa historio. La Demono estas ĉe la radiko de la unua danĝero de la homaro; ĝi estis la trompa kaj fatala tentanto de la unua peko, la origina. Depost tiu falo de Adamo la demono akiris ian regadon sur la homo, de kiu nur la elaĉeto de Kristo povas nin liberigi. Tio estas la ĝisnuna historio: ni memoru la ekzorcismojn de la bapto kaj la oftajn menciojn de la sankta Skribo kaj de la liturgio pri la agresema kaj premanta "malluma potenco" (v. Luk. 22:53; Kol. 1:13). Ĝi estas la unuaranga malamiko, la laŭdifina tentanto. Tiel ni scias, ke ĉi tiu malluma kaj malkvietiga malamiko vere ekzistas, ke ruze kaj perforte ĝi ankoraŭ agadas; ĝi estas la kaŝita malamiko, kiu dissemas erarojn kaj malfeliĉojn en la homan historion. Oni memoru la instruplenan parabolon de la bona greno kaj de la lolo, sintezo kaj klarigo de la mallogikeco, kiu ŝajnas direkti niajn kontraŭstarantajn vivokazojn: "tion faris malamiko" (Mat. 13:28). Ĝi estis "hommortiganto ekde la komenco kaj patro de la mensogo", kiel ĝin difinas Kristo (v. Joh. 8:44,45); ĝi estas la sofisma insidanto de la morala ekvilibro de la homo. Ĝi estas la malica kaj ruza ensorĉisto, kiu scipovas enŝoviĝi en nin pere de sensoj, de fantazio, de volupto, de utopia logiko aŭ de misordaj sociaj kontaktoj koncerne niajn agadojn, por kaŭzi danĝerajn devojiĝojn, kvankam laŭŝajne ili estas konformaj al niaj fizikaj aŭ psikaj strukturoj aŭ al niaj instinktaj, profundaj aspiroj.

La influo de la Demono, kiun ĝi povas havi sur personojn aŭ komunumojn, sur la tutan socion aŭ sur nurajn okazaĵojn, estus tre grava ĉapitro de la katolika doktrino, kiun oni devus denove pristudi, dum nuntempe oni tion ne faras. Kelkaj opinias trovi sufiĉan kompenson ĉe la psikanalizaj kaj psikiatraj studoj aŭ ĉe spi-

ritismaj esploradoj, nuntempe bedaŭrinde tiom disvastigataj en kelkaj landoj. Oni timas refali en malnovajn maniĥeismajn teoriojn aŭ en timigajn fantaziajn kaj antaŭjuĝajn irejojn. Nuntempe oni preferas sin montri fortaj kaj senantaŭjuĝaj, oni volas ŝajni pozitivistoj,eĉ se oni kredas je tiom da magiaj aŭ popularaj sensencaĵoj, aŭ des pli malbone, malfermi sian animon,- sian baptitan animon, vizititan tiomfoje de la eŭkaristia ĉeesto kaj loĝata de la Sankta Spirito! - al fiaj voluptaj esploradoj, al tiuj detruigaj de narkotaĵoj, kiel ankaŭ al la allogaj ideologiaj laŭmodaj eraroj, fendoj,tra kiuj la Malbonulo kapablas facile eniri kaj misordigi la homan pensmanieron. Ni ne asertas, ke ĉiu peko rekte devenas de diabla sugesto (v.s.Tom.1,104,3), sed estas certe, ke kiu ne estas singarda kun morala severeco pri si mem (v.Mat.12:45;Efes.6:11), sin metas sub la influon de la "mistero de malbono" pri kio parolas S.Paŭlo (2 Tes.2:3-12), kio faras tre dubinda nian savon.
Nia doktrino fariĝas malcerta, ĉar ĝi estas sub la mallumo de la Demono. Sed nia scivolemo, ekscitita de la certeco de ĝia multenombra ekzisto, proponas du demandojn: Ĉu estas signoj, kaj kiuj ili estas, pri la diabla agado? Kaj kiuj estas la defendrimedoj kontraŭ tiel insida danĝero?
La respondo al la unua demando postulas multan prudenton, kvankam la spuroj de la Malbonulo ŝajnas kelkfoje evidentaj (v.Tertul.Apol.23). Ni povas supozi ĝian perfidan agadon tie, kie la forneo de Dio fariĝas tuteca,akra kaj absurda, kie mensogo montriĝas hipokrita kaj potenca kontraŭ la evidenta vero, kie amo estas sufokata per malvarma kaj kruela egoismo, kie la nomo de Kristo estas atakata per konscia kaj ribela malamo (v.I Kor 16:22;12:3), kie la spirito de la evangelio estas mistifikata kaj fornegata, kie malespero estas indikata kiel la lasta vorto, ktp. Sed ĉi tio estas diagnozo tro va

sta kaj malfacila, kiun ni nun ne volas enprofundigi kaj aŭtentikigi, ne tamen senigita por ĉiuj de drameca allogo, al kiu eĉ la moderna literaturo dediĉis konatajn paĝojn (v.ekz. la verkojn de Bernanos; P.Macchi; "Satan", Etudes Carmelitaines, 1948). La problemo de la malbono restas unu el la plej gravaj kaj daŭraj problemoj por la homa spirito, eĉ post la venka respondo donita de Kristo. "Ni scias - skribas evangelisto S.Johano - ke ni naskiĝis de Dio, kaj ke la tuta mondo estas sub la Malbonulo" (1 Joh.5:19).

Al la alia demando: Kian riparon, kian rimedon ni havu kontraŭ la agado de la Demono? la respondo estas pli facila, kvankam ĝi restas malfacila en sia efektiveco. Ni povus diri: Ĉio, kio defendas nin de la peko, defendas ankaŭ nin de la nevidebla malamiko. La graco estas la nepra defendo. Senkulpeco havas ian aspekton de forto. Plue, ĉiu memoras, kiel la apostola pedagogio simboligis en la armilaro de soldato la virtojn, kiuj povas fari nevundebla la kristanon (v.Rom. 13:12; Efes.6:11,14,17; 1 Tesal.5:8). Kristano devas esti militanta, vigla kaj forta (1 Petr.5:8); kaj kelkfoje li devas sindediĉi al asketaj praktikoj por forigi diablajn atakojn. Jesuo tion instruas, indikante la rimedon "per preĝado kaj fastado" (Mark.9:29). Kaj la Apostolo indikas la ĉefan sekvendan regulon: "Ne permesu, ke malbono venku vin, sed vi venku per bono malbonon" (Rom. 12:21; Mat.13:29).

Konsciante do pri la aktualaj danĝeroj en kiuj dum nia tempo troviĝas kredantoj, eklezio kaj mondo, ni klopodas doni signifon kaj efikon al la kutima peto de nia ĉefpreĝo: "Patro nia... liberigu nin de la malbono!" Al tio helpu ankaŭ nia Apostola Beno.

DON RUA ESTIS deklarita "beata". Asignante al li la gloron de la altaro, Paŭlo 6a reliefigis, kio estas por la eklezio kaj por la dia popolo lia atesto de kredo kaj

de amo. Per la solena ceremonio de la 29a de oktobro la eklezio agnoskis en la nova beatulo ekzistadon dediĉitan al la plena imitado de Kristo kaj al la servo de la homoj. Proponante ĉi tiun konsumitan figuron de sacerdoto-entute sindono kaj sinofero- la eklezio intencas, ke li fariĝu ekzemplo por la kristanaro. En sia parolado la papo insistis pri la aktualeco de la ekzemplo de Don Rua; pri la devo, la neceso atingi de la tradicio la lumon, kiu montru la irendan vojon, kaj pri la fideleco al la eklezia instruado, kiu direktas la pensojn kaj la evoluon de la kristana vivo. Bela spektaklo estis la ĉeesto de multegaj membroj de la triobla salezana familio: religiuloj, fratinoj, kunlaborantoj, kiuj ĝojegis pro la evento, montranta la ĝustan direkton de la celo de tiu vivo, kiu donis tiom da sanktuloj al la ĉielo, da apostoloj al la surtera eklezio de Kristo."La mirinda fekundeco de la salezana familio - diris la papo en sia parolado - kio estas unu el la plej evidentaj kaj signifaj ekzemploj de la vitaleco de la eklezio, havis en Don Bosco sian originon, kaj en Don Rua la kontinuecon. Kaj tio donis okazon al la papo insisti pri la graveco de tradicio, nuntempe unu el la plej kontestitaj valoroj. "Jen la aŭtentika instruado de Don Rua: esti daŭrigantoj, sekvantoj, disĉiploj de plialta majstro. Al la salezanoj li instruas esti salezanoj; al ĉiuj respekton al la majstro. La grandeco de la disĉiplo dependas de la saĝeco de la majstro. Sekvi majstron ne estas pasiveco, sklaveco, sed fermento, vojo al perfekteco".

POR OKCENT MILIONOJ da fidelaj muzulmanoj konkludiĝis la monato Ramadan, karakterizita per la absoluta fasto ekde la sunleviĝo ĝis la sunsubiro. Tiuokaze p.Couq, komisiita por islamismo ĉe la Sekretariato por ne-kristanoj, adresis al ĉiuj muzulmanoj fratecan bondezir-mesaĝon. "Ĉi tiu nia amikec-esprimo - ri-

markas p.Couq - ne estas formala kaj konvencia; ĝi estas sincera. Multaj muzulmanoj kaj kristanoj kuraĝigis nin ripeti tion ĉiujare, fakte ĉi tio donas al ni eblecon por renkontiĝo kun kredantoj, trans la limoj kulturaj, sociaj, naciaj aŭ raciaj, kaj por kuniĝo ĉe la plej profundaj radikoj de nia humaneco, de kie devenas frateco kaj solidareco. Ni ĉiuj soifas komuniki unu kun la alia ĉe tiu sekreta nivelo de nia memo, kie estas eble malkaŝi, ke ni ĉiuj estas filoj de la sama Dio, mulditaj el la sama tero. Ni ĉiuj scias, kiom ĉi tiu amikeco estas en danĝero, kaj manka dum la plej malfacilaj momentoj. Vi kaj ni tion spertas kaj kelkfoje ni estas viktimoj de maljustaĵoj, kiuj premas homon. Same kiel multaj aliaj, ni konscias pri nia nesufiĉo. Dum tiuj momentoj malmulte efikas vortoj. Kion ni povas fari por aliigi ĉi tiun mondon devojiĝintan kaj dispecigitan? Zorgoj pri estonteco kaj suferoj de nia tempo devigas nin rigardi konfide unu la alian, forigante la antaŭjuĝojn, kiujn ni kuntrenas kaj kiuj apartenas al pasinteco. La cirkonstancoj premas, urĝigas nin. Jes, venis horo por la kredantoj de ĉiuj religioj, aparte por ni kristanoj kaj muzulmanoj, apelacii al nia komuna kredo je Dio. La horo venis, en kiu la grandaj religiaj mesaĝoj al la homaro reaŭdigu sian vorton. Ni ĉiuj povas lerni kaj tiri profiton unuj de aliaj. Pasis la tempo, en kiuj la religioj ekskomunikis sin reciproke. Nun, male, ili devas renkontiĝi por meti komune siajn riĉecojn. Atestoj de bona volo mankas - asertas ankoraŭ p.Couq - nek inter muzulmanoj, nek inter kristanoj. Kiam ni renkontiĝas, ni ekvidas kun miro kaj ĝojo, kiom ni estas proksimaj. Kial do ni ne klopodos plifunde per interkontaktoj, por doni al nia socio pli grandan ateston de justeco, de respekto, de amo? Kion ni timas, se Dio estas kun ni? Nia kredo estas nevenkebla forto. Ĉar ni kredas je la sama Dio, ni pe-

tu de li, ke ni fariĝu pli kaj pli proksimaj, tiel ke kune, laŭebleco ni kunlaboru por starigi en la mondon pli grandajn veron, pacon kaj amon.

HONGKONGO - 4 MILIONOJ da loĝantoj sur terpeceto - estas klara malkonsento al la komuna opinio,pri nepenetrebleco en la azian kontinenton de la Krista mesaĝo. La ĉeesto de la eklezio en la lasta Azia kolonio komenciĝis en la jaro mem de ĝia fondiĝo. Dum jarcento malmultaj estis la progresoj; sed en la lastaj dudek jaroj ili fariĝis pli kaj pli viglaj. Dum la urbo kreskadis pli rapide ol ĉiu ajn alia urbo en la mondo pro amasa alfluo da rifuĝintoj, la diocezo alpasis de malgranda misio al matura loka eklezio. Kresko favorita unue de absoluta civila kaj politika libereco, en kiu la eklezio povos labori kaj progresi; due de la laŭnatura bo neco de la ĉino, de lia emo pri religio, kaj depost lia konvertiĝo, de lia sincera kaj fortika kredo.Fine, de la bonega laboro de la pasintaj misiistoj en ĉiuj evangelizaj sektoroj. Hodiaŭ la Hongkonga eklezio estas rimarkinda pro sia nombra konsisto: 250.000 kredantoj, kaj pro la abundo de la konvertoj, kiuj superis kelkfoje dekmil dum unu jaro. Sed ĉefe ĝi estas religia direktilo en medio, kiu daŭre kaj profunda aliiĝas.Oni serioze laboras ne tro zorgante la kvanton, sed prefere la kvaliton de la kredantoj, kiuj plejparte konvertiĝis dum la lastaj 10-15 jaroj. Oni celas aliigi ilin al aktivaj apostoloj. Kvankam troviĝas en la malgranda diocezo sacerdotoj, reliĝiuloj, fratinoj el pli ol 30 nacioj, ekzistas inter ĉiuj ekzemplodona unueco en la laboro. Aparta zorgo estas la formado kaj nuntempigo de la klerikaro, kiu devas vivi en kosmopolita urbo, karakterizita de tre rapida evoluiĝo. Al la seminarianoj oni celas doni, krom la tradicia preparo pri filozofio kaj teologio, universitatnivelan formadon kune kun

pli intensa spirita konscio. La seminario pligrandiĝis, por ricevi studentojn, kaj profesorojn de la proksima diocezo de Makao. Mons. Hsu, unua ĉina episkopo en la urbo, posedas iniciateman spiriton, kaj estas ĉiam vigla en stimulado al religia progreso. Kune kun la evangelia aktiveco iras ankaŭ la socia kaj la karitata. La eklezio instruas en la diocezo 250.000 junulojn, plejparte ne katolikajn. Kaj en la urbaj hospitaloj ĝi kontribuis en la socia asisto, aldonante al la 16 mil jam funkciantaj, 2.000 litojn por malriĉuloj. Pro ĝia tute aparta geografia kaj politika situacio la Hongkonga eklezio estis elektita kiel sidejo de la organizacio por la diocezaj tutkontinentaj interrilatoj.

LA KVARDEKA INTERNACIA Eŭkaristia Kongreso okazos en Melbourne, Aŭstralio, de 18a ĝis 25a februaro 1973a. Ĝi estos kongreso "nova", tiusence, ke ĝi montros fizionomion diversan de antaŭaj kongresoj. Ĝi fakte havos la karakterojn de la tempo kaj de la lokoj, en kiu ĝi disvolviĝos, kaj akordiĝos kun la novaj liturgiaj dispozicioj. Ĝia temo elektita de Paŭlo 6a, estos la vortoj de Kristo: "Amu vin reciproke, kiel mi mem amis vin", ĉar ĝia celo estas intensigo de la frateca kristana karitato en la mondo. Aliflanke ĝi estos kiel ĉiuj antaŭaj aŭtentikaj eŭkaristiaj kongresoj, tio estas kunveno de kristanoj el ĉiu mondparto, kiel decas por la plej solena atesto de kredo kaj danko al Kristo, ĉiam necesa, sed precipe dum ĉi tiu kredokrizo. Antaŭ la ĝisekstrema neniiĝo de Jesuo en la Eŭkaristio, eĉ pli granda ol la morto mem sur kruco por nia savo, estas konvena, eĉ, postulata nia plejalta glorigo de l' Hostio je tutmonda skalo. Ĝi estas ankaŭ respondo al kelkaj herezoj antikvaj, sed renovigitaj ankoraŭfoje, kiuj forneas la reálan ĉeeston de Kristo en la Eŭkaristio, ekster la meso. Tre oportune Paŭlo VI, okaze de la ĉijara festo de la Korpo de Kristo rememorigis ĉi tiun kredoveron. "La

adorado de la tre sankta Sakramento, solene montrita, aŭ kaŝita en la tabernaklo - li diris - permesas iel daŭrigi la meson kaj asimili ĝin: ĝi efektiviĝas daŭran amesprimon, respondantan al la senfina amo, kiun la Sinjoro donas al ni el la Hostio". Kvankam en la modernaj eŭkaristiaj kongresoj oni klopodas malaperigi ĉian triumfalisman aspekton, tamen oni klopodos elvolviĝi ĉi tiun eventon per ĉiu ebla soleno kaj brilo. Oni ne zorgos pri la hodiaŭaj fariseoj kiuj, konsentante al la grandegaj elspezoj por vantaĵoj, murmuros pri niaj kongresoj: "Por kio estas ĉi tiu malŝparo? Ĉu ne estis plibone doni al malriĉuloj?" Vere, oni devas timi ne doni tro multe al la Sinjoro, sed tro malmulte. Kiel signo de la respekto al la kredo de alikonfesianoj, kiun la ekumenisma klimato estigis, ni volas mencii, ke la Konsilio de la Kristanaj Eklezioj de Viktorio en Aŭstralio, aprobis dum sia lasta kunsido proponon inviti la membrojn de la anglikana kaj ortodoksa eklezioj kaj de la 250 protestantaj konfesioj, preĝi, por ke la 40a eŭkaristia mond kongreso de la katolika eklezio, estu de Dio benata kaj kontribuu al la kresko de la vivo en la eklezio. En la sama kunsido la Konsilio proponis, ke ĉiuj aŭstraliaj kristanoj partoprenu en interkonfesia kunveno pri Eŭkaristio. Tiu kunveno, kiu okazos ĉe la duono de ĉi tiu oktobro, kaj daŭros unu monaton kaj duonon, estas organizita de katolikoj, ortodoksoj kaj protestantoj, kun la temo: oni studu kune pri Eŭkaristio". La rezolucio akcentas, ke"tiuj studoj ne kunportas devige akordiĝojn pri doktrino", kaj ke "ili ne devas esti rigardataj kiel klopodoj por atingi konkretan kaj senperan unuiĝon".

LA DIREKTO DE DU parokoj en la aŭstria diocezo de Graz-Sekaŭ estis komisiita al religiulinoj. La iniciato estis decidita de episkopo mons. Weber, pro la grava malsufiĉo de la loka dioceza klerikaro. La religiulinoj priparolitaj estis komisiitaj pri la administracio de

la du parokoj, kaj ankaŭ pri la religia instruado, pri la eksterlerneja edukado de infanoj, pri la karitata kaj socia helpo, pri la liturgia kaj pri la katekiza formado.

KARDINALO JEAN DANIELOU estis elektita je la 9a de novembro, membro de la Franca Akademio, por okupi la lokon vakintan pro la morto de kard. Tisserant. Estas tradicie en tiu Akademio, ke inter la honoraj membroj troviĝu ankaŭ eminenta prelato. La Vatikana gazeto "L'Osservatore Romano" raportante pri tiu fakto, konigis liston de ĉirkaŭ dudeko da libroj, inter la plej gravaj verkoj de la kardinalo.

DELEGACIO DA POLAJ episkopoj alvenis al Romo la 7an de novembro, gvidata de la primaso de Pollando, kard. Stefan Wyszynski, por danki la papon pro la reorganizado de la diocezoj en la eks-germanaj teritorioj de Oder Neisse. La delegacio inkludis ankaŭ kard. on Woytyla, ĉefep. de Krakovio kaj 5 episkopojn de la novaj diocezoj, starigitaj antaŭ kelkaj monatoj de la S. Sidejo en la okcidentaj kaj baltaj teritorioj, sekve de la akordoj inter la registaroj de Pollando kaj de Germanujo. Kune kun la aliaj polaj episkopoj, kiuj jam de kelkaj tagoj troviĝis en Romo, ili estis akceptitaj de la papo la 9an de novembro. Parolante al ili Paŭlo 6a esprimis al la tuta katolika Pollando "elekta porcio de la eklezio" sian ĝojon, ĉar pere de siaj fratoj en la episkopeco li povas kontaktiĝi kun ĝia popolo, tiel kara al sia koro; kaj invitis ĉiujn al fideleco kaj al progreso en la religia vivo.

LA UNUA DATREVENO DE LA BEATIGO de p. Maksimiliano Kolbe, estis solene celebrita en Pollando je la 15a de oktobro sur la tereno de la sama hitlera koncentrejo, kie la sankta franciskano oferis sian vivon por savi patron de familio. En la soleno partoprenis kun la primaso de Pollando, pluraj aliaj kardinaloj, multaj e-

piskopoj el pluraj nacioj kaj amaso de pli ol 500.000 pilgrimantoj. Ankaŭ la pola registaro aranĝis ĉiujn necesajn civilajn servojn por la grandioza kunveno. Kuncelebris en la meso multaj sacerdotoj estintaj malliberuloj en la sama koncentrejo. Kvardeko da pastroj disdonis la sanktan komunion sur tiu tereno, la plej granda tombejo en la historio de la homaro, kie estis murditaj kun la beatulo kvar milionoj da homoj el 28 nacioj. Kie la hororo de tia buĉado ne haltigis la murdistojn, beata Kolbe montras, ke nur amo povas venki ĉiun malbonon, kaj eĉ el homa cindro povas elkreski nova vivo.

(el raporteto de sac. Zielonka)

LA 23an DE SEPTEMBRO, sub la protekto de S. Nikolao de Flue, la fama ermito, kiu en la 1481a haltigis civilan militon interne de la Konfederacio de la svisaj kantonoj, malfermiĝis la "Sinodo 72a" aŭ pli ĝuste, la sinodoj de la ses svisaj diocezoj, Bazel, Kojra, Friburgo, Lugano, San-Gallo kaj Siono, kaj la sinodo de la tre malgranda teritorio, kiu estas sub la jurisdikcio de la abatejo Sankta Maŭrico. Post 3 jaroj da preparo, enketoj, laborgrupoj (precipe en la diocezo de Friburgo), la laboroj startis samtempe kaj finos nur la 11an de majo 1975a. Ĉio estis fiksita kun horloĝa ekzakteco, ĝuste pro tio ke la svisa situacio estas aparte kompleksa. Ankaŭ protestantoj partoprenos en la Sinodoj, kiel invititoj aŭ observantoj. La unua plena sesio okazis la 3an de novembro. Kaj la Sinodoj finiĝos samtempe la 11an de majo 1975a.

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONKOTIZO: £. 1.000 (Us.dol. 1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al: D.ro C.C. Ferrari
aŭ pĝk al: 1-37638 - P. Giacinto Jacobitti

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo